# *Sesiis en Moskvo la interregistrara komisiono Kubo-Rusio*




Moskvo, nov 18 (RHK) La rusa vicprezidanto Dimitri Chernishenko kaj la vicunua ministro kuba Ricardo Cabrisas prezidis la19-an sesion de la interegistara komisiono por ekonomia kaj sciencteknika kunlaboro.

Amba? partneroj pritraktis temojn ligitajn al la ?efaj programoj de ekonomia kaj socia evoluo de Kubo, en la bran?oj de energio, transporto, edukado, agrikulturo, publika sano, kulturo kaj turismo, scienco, teknologio kaj medio.

La? interkonsento, amba? landoj prilaboros novan ekonomian agendon duflankan, kiu enhavu la ?efajn areojn kaj strategiajn celojn de la reciproka kunlaboro  en la ekonomia, komerca, financa sferoj kaj kunlaboro ?is 2030.

Same, oni taksis la internacian situacion, inkluzive de la faktoroj, kiuj hodia? havas negativan efikon al la disvolvi?o de amba? landoj, aparte la intensigita ekonomia, komerca kaj financa blokado de Usono kontra? Kubo, kaj la maljustaj sankcioj truditaj al Rusio.

Fine oni interkonsentis, ke la dudeka sesio de tiu ?i komisiono okazos en Havano en 2023, en dato, kiu estos specifita poste.

Fonto: PL

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/305327-sesiis-en-moskvo-la-interregistrara-komisiono-kubo-rusio](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/305327-sesiis-en-moskvo-la-interregistrara-komisiono-kubo-rusio)

**Radio Habana Cuba**